N-o 3. **BULTENO** 1936. 10. IV.

**DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR.**

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas: O. GINZ, ST. KAMARYT.*

*Senpage por membroj de Esperanto-Asocio en ĈSR. Aperas sesfoje dum la jaro.*

# Divido de la laboro de funkciuloj de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko.

La unua komitata kunveno la 16-an de februaro 1936 dividis la funkciojn de la komitato elektita en Brno kaj starigis vicon de komisionoj, en kiuj estas kunigataj agado kaj iniciato en diversaj fakoj de nia laboro. La kresko de laborantoj ebligis provi pli grandan nombron de komisionoj. Ankaŭ ni sukcesis en kelkaj fakoj krom la komisionestro trovi du—tri liajn kunlaborantojn. La suba listo donas iliajn nomarojn. Ĉe kelkaj ni provis ankaŭ difini la taskojn pli detale. La interesantoj povas pri difinita fako turni sin senpere al komisionestroj.

Komitatanoj:

Prez. *Dr. Stan. Kamaryt,* Bratislava, Zochova 3.
Vicprez. *PhMr Franz Höfert,* Znaim, Otakar-str. 2.
Vicprez. *Otto Ginz,* Praha II., Stárkova 4.
Ĝen. sekr. *Frant. Staněk,* arkitekto, Praha XI., Biskupcova 11.
Kasisto *J. Friedrich,* Košice, Jarná 13.
Sekretario *Josef Karl Donner,* ŝparkasa oficisto, Plan apud Marienbad.
Librotenisto *Theodor Kilián,* profesoro, Třebíč.
Komitatanoj: *Robert Bloch,* Praha XVI., 106; *Frant. Heikenwälder,* librotenisto, Prostějov, Vrchlického 18; *Ludoviko Krysta,* Český Těšín; *Jaroslav Šustr,* komercisto, Praha, Dlouhá 53; *Josef Vondroušek,* bankoficisto, Brno, U botanické zahrady 31.

Vickomitatanoj:

*Frant. Buhr,* Praha XVIII., Bělohorská 189.
*Jan Janda,* oficisto, Kolín, Komenského 194.
*Josef Kožený,* profesoro, Ml. Boleslav, Nádražní 158.
*Josef Poncza,* Český Těšín.
*Miloslav Staněk,* komerca administristo, Praha XI., Biskupcova 21.
*Anna Tarantíková,* oficistino, Praha XI., Karlova 8.

Membroj de Kontrola komisiono:

*J. V. Dolinský,* faka instruisto, Turč. Sv. Martin, Mudroňova 31.
*Leoš Feigenblatt,* dentisto, Kyjov, Újezd 733.
*J. V. Šamla,* redaktoro, Brno, 14, Alešova 51.

Vicmembroj de Kontrola komisiono:

*Ing. Lad. Krajc,* profesoro, Moravská Ostrava, Erbenova 29.
*Ing. St. Ant. Veselý,* Brno, XVI., KSK.

Komisionoj:

Oficejo: *Frant. Slavík,* librotenisto, Praha XIX., Uralské 447. Administro de membroj de EAĈSR kaj de UEA *Oldřich Štěch.*

Propagando (instigado, personaj rilatoj individuaj, vizitado de lokoj, dividado de laboro): *J. K. Donner.*

Eldonado de Bulteno: *O. Ginz, Stan. Kamaryt, Fr. Slavík.*

Gazetara servo: *O. Ginz (Mil. Staněk, J. Dlabač).*

Radio: *J. V. Šamla.*

Literaturo: *Dr. Tomáš Pumpr,* Broumov, okres. úřad.

Turismo (kune: kongresaj aferoj, prizorgado de fervojaj rabatoj, faciligoj pri vizoj, propagando por vizito de nia lando): *Robert Bloch.*

Ekspozicia materialo: *Emil Beran,* staciestro, L. Bělohrad.

Lernejaj aferoj: *Dr. Stan. Kamaryt.*

Studentoj: *Ing. St. Ant. Veselý,* Brno.

Junularo: *Vuk Echtner,* Praha, Nusle II-741.

Sciencaj aferoj: *Dr. Stan. Kamaryt (Ing. Rud. Novák,* Plzeň, Mánesova 59).

Normigaj aferoj: *PhMr Franz Höfert.*

Poŝtistaj aferoj: *Ferd. Votrubec,* Praha VII., Schnellova 21.

Sekureca servo kaj kriminalistiko: *Josef Vavrovský,* Praha II., Vodičkova 34. (III-III.)

Tramistoj: *Adolf Dlabač,* Praha VIII., Poděbradova 59.

# La XVII-a ĝenerala kunveno de Ĉehosl. Asocio Esperantista

okazis la 15-an de februaro 1936 en Praha en klubejo de Esp. klubo (kafejo Louvre).

Ĉeestis 45 membroj, skribe reprezentitaj 104, sume 149 membroj. Krome 2 gastoj. La ĉeestantoj estis el Bratislava, D. Bousov, Jablonné n. O., Košice, Lázně Bělohrad, Plan, Praha, Prostějov, Přelouč, Tožice, Zbečno, Znaim, Žilina. Sume 13 lokoj.

La kunveno daŭris de 20'40 ĝis 24 h.

Malfermante la kunvenon la prezidanto rememorigis morton de direktoro Robert Kreuz kaj de niaj membroj mortintaj dum pasinta jaro Karel Loveček (Holešov) kaj Emanuel Kubásek (Plzeň). La ĉeestantoj honorigis ilian rememoron per ekstaro kaj duminuta silento.

Salutaj leteroj venis de grupoj en Bratislava, Č. Budějovice, D. Bousov, Brno, Moravská Ostrava, Olomouc, Pardubice, kaj de samideanoj vicprezidanto dr. Pitlík (el Garmisch-Partenkirchen, kie *li* ĉeestis oficiale pro sia ofica funkcio), St. Borovka (Hradec Králové), A. Horáček (Kutná Hora), Ing. L. Krajc (Moravská Ostrava), T. Kilián (Třebíč), J. Kudela (Bielkovice), A. Novotný (Těpeře), B. Strnad (Trutnov), J. Šupichová (Praha), O. Vaněk (Č. Třebová), R. Vilémová (Uh. Hradiště), J. Vondroušek (Brno).

La prezidanto aparte salutis germanajn samideanojn Mr Fr. Höfert (Znaim) kaj J. K. Donner (Plan), komitatanojn de EAĈSR, kiuj venis jam al la ĝen. kunveno.

1. **Protokolo pri la lasta ĝen. kunveno** ne estis laŭtlegita, ĉar ĉiuj konsentis aprobi ĝin tiel, kiel ĝi estis publikigita en la Bulteno.

2. **Raporto pri la agado kaj pri la kaso.** Ĉar ĉiuj anoj estis ricevintaj la raporton presitan en la dua numero de Bulteno, oni ĉiesvoĉe konsentis ne legi ĝin, sed tuj diskuti pri la koncernaj alineoj.

a) Administrado. Ĝen. sekretario informas, ke s-o V. Šavel depost 1-a de februaro 1936 ne plu estas jam nia oficisto. Prezidanto esprimas al s-o Šavel dankon pro la laboro dediĉita al ni konscience dum la tuta jaro. Ginz informas, ke li serĉas novan taŭgan ejon. Anstataŭ kun unu oficisto li provos labori en venonta jaro kun areto de bonvolaj helpantoj, kiu jam estas organizata el membroj de Praha. En la lasta tempo jam eklaboris sisteme precipe Vavrušová kaj Košler kaj li tre fidas al ilia persistemo kaj laborfervoro. La administro de UEA-anoj jam ekmarŝis sur regulan vojon kaj espereble funkcios kontentige.

b) Ekspozicia materialo. Dr. Vaněk informas, ke li vidis la materialon lokigitan en du ĉambroj ĉe staciestro Beran en L. Bělohrad. La lokigo estas kontentiga kaj la registra kaj konserva laboroj progresas. La kunveno kontente akceptis tiun informon kaj komisiis ĉeestantan anon el L. Bělohrad esprimi al tiea klubo kaj ĝia prezidanto nian dankon.

c) Informado pri esp-istaj entreprenoj. E. Goldstein el Žilina esprimas saluton de siaj samgrupanoj kaj plendas, ke la stacidoma tabulo ne estis sendita post mendo. Ĝen. sekretario respondas al li, ke la grupo ne pagis kun la mendo. La samtempa sendo de la mono estas ja nepra kondiĉo por plenumo de la mendo. Kasisto Friedrich demandas, kial Žilina grupo ĝis nun ne pagis kotizojn; li ja persone estis en la urbo, ĉeestis la kunvenon kaj donis detalajn klarigojn. Goldstein respondas, ke la klubo ne volis pagi la kotizojn, ĉar ĝi volis atendi la tekston de la statuto. Friedrich klarigas, ke la fina redakto de la statutaro estis temporaba laboro. Ĝi tamen jam estas finita kaj la rondetoj dezirantaj tion, ricevos baldaŭ tekstojn de la statuto. Sed ni ĉiam rekomendas al samideanoj, ke ili ne tuj uzu siajn laborpovojn por teda laboro formale societa; sed ili provu kunveni por pliperfektigadi sin en la lingvo, diskuti pri literaturaĵoj, pri propagandaj eblecoj ktp. Ĝen. sekretario Ginz tre rekomendas zorgi, ke la komenca entuziasmo ne finu en pli posta neaktiveco. Goldstein konsentas pri la donitaj informoj kaj klarigoj kaj diras, ke lia grupo jam decidis sendi la sumon de kotizoj por 16 anoj por 1935. Prezidanto dankas lin pro lia fervoro.

d) Administrado de membroj. La ĝen. sekretario kaj kasisto sciigas, ke depost pretigo de la listo en Bulteno venis pagoj de kluboj en Prostějov kaj Olomouc (por pluaj membroj) kaj sciigo pri pago de Prešov. Ili esprimis kontentecon pri tiu fakto kaj firman fidon, ke ankoraŭ la ceteraj nepagintaj kluboj baldaŭ pagos siajn ŝuldojn. La prezidanto atentigas pri kontentigaj nombroj ankaŭ en Košice, L. Bělohrad, Uherské Hradiště. Kun aplaŭdo estis akceptita sciigo, ke E. K. en Č. Budějovice aliĝis por 1936 korporacie kaj pagis krome 100 Kč por Oficeja fondaĵo. Kasisto de E. K. en

Praha Hromada sciigas al demando de prezidanto, ke malgrandiĝo de nombro de anoj el la Klubo estas kaŭzita pro nealiĝo de kelkaj klubanoj, kiu sekvis el persona disputo okazinta en la lasta kluba jarkunveno. Sed la nombro de klubanoj jam kreskas denove; ekz. el la kurso, kie li instruas, aliĝis jam 25 novaj anoj al la Klubo. Sekvis diskuto pri rilatoj inter la lokaj grupoj kaj asocia estraro, en kiu estis esprimitaj precipe jenaj ideoj: La gvidantoj de laboroj asocia kaj kluba en Praha konkurence devas altiri la laboremajn kaj taŭgajn homojn (Ginz, Šustr). En la Asocia komitato estas malmultaj Prahaanoj (Friedrich). Sed tamen oni multon faras por la Asocio, firmigante pozicion de la Klubo. La Asocio devus apogi poziciojn de la lokaj grupoj inter la esperantistaro (Šustr). Sed ni ne forgesu, ke en Praha mem ekzistas dek lokaj kluboj (Bloch). Jes, sed ĉu estas konstateblaj iaj rezultoj de laboro de ekz. Klub malostranských esperantistů, pri kiu oni ofte legas en jurnaloj, sed neniam sukcesas trovi ian daŭran signon de ĝia aktiveco? (Friedrich). Certe estus plej logika sintenado ne akcepti izolajn membrojn el lokoj, kie ekzistas grupo korporacie aliĝinta. Sed tia solvo ĝis nun ne estas ebla pro praktikaj konsideroj (Kamaryt).

e) B u l t e n o k a j L i g i l o. Prez. sciigas, ke li mem kaj pluraj komitatanoj kaj membroj studis eblecon de simpligo, kiu rezultus el tio, se la Bulteno estus publikigata en Ligilo. Sed la afero tamen bezonas tre detalan studon. Oni devus eviti la eblecojn perdi la membrojn, se la abonantoj ricevus pro la sama abonpago krom la revuo ankoraŭ la Bultenon. Ankaŭ oni ne rajtas forgesi, ke Ligilo estas privata posedaĵo de la eldonantoj, kaj oni devas respekti iliajn vidmanierojn. Tamen la eblaj simpligoj estas tiom gravaj, ke oni nepre devas provi tian novaranĝon, se el ĝi ne rezultos gravaj danĝeroj por kresko de la asocio. — En la sekvinta vigla diskuto estis de ĉiuj esprimita kontenteco pri pozitiva sintenado de Ligilo al la Asocio kaj konstatita bela nivelo de la redakto, tre preciza aperado kaj tre taŭga tipografia aranĝo. Avantaĝojn de aparte eldonata Bulteno klarigadis kaj pruvadis Hromada, dro Fousek, Bloch, Fr. Staněk. Ili akcentis ankaŭ precipe psikologiajn argumentojn por konservi la ĝisnunan dividon kaj lojalan kunlaboron. La legantoj iam aŭ ofte pli fidas gazeton ne-oficialan. Ginz akcentis, ke redaktante la Bultenon, la redakcio zorge evitas, ke ĝi ne fariĝu gazeto, kvankam de pluraj flankoj venis instigoj por kreo de gazeto. Por kunigo de Bulteno kaj Ligilo en unusolan gazeton pledis Friedrich, Koutek: Ŝparo de energio, forigo de nuna bezono ripeti informojn en Ligilo kaj Bulteno, ebleco de financa ŝparo, ne proponu al esp-istoj tro da gazetoj, multaj preferas beletristikaĵojn, ili ricevu ilin kun la Bulteno, bezono batali kontraŭ apartiĝemo de ĉs. esperantistoj. Ni rigardu kiel ekzemplon Svedujon kaj Nederlandon. Estas hontinda stato, ke dum tiuj tagoj festis jubileon de sia multjara ekzisto klubo, kiu pagas al Asocio kotizon por unu membro. Heikenwälder, redaktoro de Ligilo, donis detalan informon pri stato de Ligilo kaj deklaris pretecon de redaktantoj kaj eldonantoj trovi aranĝon, kiu kontentigus plej bone bezonon de enlanda movado. La diskuto estis finita per unuanima decido komisii komitaton de EAĈSR per plua traktado kaj definitiva solvo.

f) N u n a s t a t o d e U E A. Prezidanto informis pri la bona impreso, kiun vekas energia klopodado de prez. Bastien por certigi post morto de dir. Kreuz la pluan marŝon de administro de UEA. La kunveno rekomendas al ĉiuj nialandaj esp-istoj resti kaj realiĝi kiel aktivaj anoj de UEA.

g) I. E.-M u z e o e n W i e n. Bloch rekomendas peti, ke Muzeo publikigu en taŭga tempo kaj formo siajn kalkulojn. Akceptite ĉiesvoĉe. Kamaryt kaj Heikenwälder informis laŭ peto de kelkaj ĉeestantoj pri siaj observoj dum vizito en la Muzeo.

Bloch atentigis pri la Esperanto-fako en Nacia muzeo en Praha kaj pri bezono zorgi, ke la esperanto-kolekto kresku. Kamaryt opinias same. La nova komitato nepre ne forgesu tiun gravan pozicion kreitan antaŭ du jaroj.

h) U.-K o n g r e s o e n W i e n. Bloch rekomendas, ke kongreso indiku sumojn de la kotizoj en a. ŝilingoj, ne en svisaj frankoj.

i) K a s o. Kasisto Friedrich laŭtlegis kasan raporton, kiun li disponigis en 5 ekzempleroj al ĉeestantoj. La kunveno esprimis kontentecon, ke la asocia kapitalo kreskis je 2.024 Kč. La tre rimarkinda kresko de sumo de kotizoj rezultas el pago de kotizoj por pasintaj jaroj. Ĝi sekvis pro zorga dissendo de admoniloj. La bilanco estas publikigata en tiu ĉi numero. La komitato proponas ne doti la fondaĵojn.

3. **Raporto de la revizoroj.** Ano de la kontrola komisiono Konstantin Koutek de-

klaras, ke li esploris la kontlibron asocian kaj komparis ĝin kun la kasdokumentoj. Li trovis la kontojn kaj kalkulojn en tre bona ordo kaj interrespondon de enskriboj kaj dokumentoj. Li gratulas la kasiston pro la tre bona kasista laboro kaj rekomendas al la ĝenerala kunveno la aprobon de la finkalkuloj pri la jaro 1935.

Poste estis la raportoj pri la agado kaj pri la kaso ĉiesvoĉe aprobitaj.

4. **Eniĝo en Esperanto-Asocion en Ĉeĥoslovaka Respubliko.** La prezidanto resumas mallonge la decidojn de la kongreso en Brno kaj de fonda ĝenerala kunveno de EAĈSR kaj demandas, ĉu la kunveno aprobas decidon de la komitato, ke ĈAE eniĝu en la novan asocion kaj transdonu al ĝi ĉiujn propraĵojn kaj posedaĵojn. La kalkuloj de ĈAE estis jam depost 1-a de januaro 1936 kalkulataj sur kontoj de EAĈSR.

La kunveno aprobis ĉiesvoĉe.

5. **Elektoj.** Ĉar pro tio elektoj jam ne estas bezonaj, neniu estis plu elektata. Per necesaj likvidaj laboroj estis komisiita la ĝisnuna ĈAE-komitato.

6. **Liberaj proponoj.**

a) Eldoni jarlibreton kun adresaro de membroj, proponas E. K. en Č. Budějovice. Ĉar la nova komitato komencis jam trakti kun BSA-adresaro pri aliĝo al EAĈSR, estis decidite provi plenumon de tiu deziro en kontakto kun inĝ. Berger.

b) Kursoj de Cseh-metoda instruisto Seppik. Kasisto Friedrich donas detalan informon pri aranĝoj en Košice kaj ĉirkaŭaĵo kaj pri lokoj, kie povos esti kursoj post fino de laboro en Košice. Li estas tre kontenta kun la rezultoj. La prezidanto dankas s-on Friedrich pri la sindono, kiun li vidigis krom en la kasista kaj turista ankaŭ en tiu ĉi fako.

c) Stacidomaj tabuloj kaj Ĉeĥoslovaka Antologio. Ĝen. sekretario atentigas, ke apudmeto de tiuj du sukcesaj entreprenoj bone vidigas diversspececon de nia laboro. La ambaŭ entreprenoj estas tre subtenindaj kaj subtenon bezonantaj. Mendu ĉiu, kiu povas!

d) EAĈSR-komitatanoj Donner kaj Höfert dankas pro la salutoj diritaj al ili de la prezidanto ĉe komenco de la agado kaj esprimas sian kontentecon povi labori en unusola asocio kun ceteraj nacioj de la respubliko. Aplaŭdoj.

La prezidanto finis la kunvenon per danko al la ĉeestantoj kaj esprimis la konvinkon, ke la EAĈSR laboros ankoraŭ kun pli granda sukceso ol la ĝisnuna. (Aplaŭdoj).

Prezidis Kamaryt. Protokolis Fr. Staněk.

## **Financa raporto pri 1935.** XVI. administra jaro de ĈAE.

| | | Aktivoj | | Pasivoj | |
|---|---|---|---|---|---|
| **Ferma bilanco:** | | Kč | h | Kč | h |
| 1. Mono en la kaso | | 12 | 10 | | |
| 2. Mono en la Pošta šparkaso en Praha | | 3877 | 90 | | |
| 3. Mono en Občanská záložna en Košice | | 6863 | 90 | | |
| 4. Inventaro (post depreno de la amortizo) | | 1220 | — | | |
| 5. Diversaj entreprenoj | | 4314 | 40 | 1750 | 70 |
| 6. Diversaj debitoroj kaj kreditoroj | | 2393 | 85 | 3705 | 10 |
| 7. Fondaĵo ekzamena | Kč 615·60 | | | | |
| „ oliceja | Kč 2613·30 | | | 3228 | 90 |
| 8. Transitivoj | | 142 | 80 | | |
| 9. Asocia kapitalo la 1. I. 1935 | Kč 8115·95 | | | | |
| Bilanca gajno | Kč 2024·30 | | | 10140 | 25 |
| | | 18824 | 95 | 18824 | 95 |
| **Bilanca Perdo-Gajno:** | | | | | |
| 1. Membraj kotizoj | | | | 12030 | — |
| 2. Procentaĵo pro enkasigado de UEA-kotizoj | | | | 1898 | 60 |
| 3. Elspezoj de administrado | | 6784 | 85 | | |
| 4. Elspezoj de propagando | | 5073 | 15 | | |
| 5. Diversaj elspezoj kaj enspezoj | | | | 333 | 70 |
| 6. Amortizo de inventaro | | 380 | — | | |
| 7. Bilanca gajno | | 2024 | 30 | | |
| | | 14262 | 30 | 14262 | 30 |

En Košice la 31-an de decembro 1935. *Josef Friedrich*, kasisto.

# Radio.

**Brno** (iam samtemte Praha I. kaj Moravská Ostrava):

5. II. Esperanta Horeto.
16. II. „Jozéĉek se učí esperantu".
26. II. Ĉeĥoslovakio laboranta: Dro B. Němec, parolado.
11. III. Esperanta Horeto. Oskar Nedbal-Leo Stein-J. V. Šamla: Pola Sango, opereto. TRAKT.
25. III. 22·15—22·30, Ĉeĥoslovakio laboranta. Dro František Smotlacha: Korpa Kulturo.
1. IV. 22·15—23·15, gaja aprila kabaredo.

Aprilo-majo, ĉiam merkrede kaj sabate 18·30-18·45 E-kurso de Prof. T. Kilian.

**Košice:**

4. II. H. Seppik pri nordanaj popolkantoj.
21. II. H. Seppik pri Esperanto kaj Svedlando.
22. II. H. Seppik, Norvegaj popolkantoj.
14. III. H. Seppik: Finnaj popolaj melodioj.

**Moravská Ostrava:**

3. II. Alois Zbavitel: Influo de Masaryk sur la antaŭmilitan Slovakujon. Trad. kaj legis Ot. Gadula.
4. II. Dro Leop. Peřich: El la pasinteco de Opava-regiono.
11. II. Vlad. Slaný: La ĉeĥoslovaka suker-industrio.
18. II. Ot. Gadula: Kion oni vidos en la 23a Foiro en Praha.
25. II. Prof. inĝ. L. Krajc: La unua fervojo en nia regiono.
10. III. MUDr. Jan Říha: Zorgado pri la sano de niaj lernej-infanoj.
17. III. Emanuel Chobot: Deveno kaj evoluo de la sindikata movado en regiono de Ostrava.
24. III. Prof. inĝ. L. Krajc: Evoluo de la radioindustrio en ĈSR.
31. III. Alois Adamus: Paskaj kutimoj en regiono de Ostrava. Trad. kaj legos Ot. Gadula.

---

# Agado de lektoro H. Seppik en orienta Slovakio.

Ni povas jam raporti pri la unuaj sukcesoj de laboro de konata Cseh-instruisto lektoro H. Seppik el Tartu (Estonio) en nia lando. La ĉefa agadkampo dum la komenco estis Košice. Post bona antaŭpreparo per gazetoj kaj afiŝoj havis tuj la unuaj aranĝoj rimarkindan sukceson. La unuan prelegon pri Estonio 9. I. ĉeestis 270 personoj kaj la publikan provlecionon 14. I. 120 pers. Sekvis 22. I. speciala provleciono por 45 instruistoj de burĝaj lernejoj kaj 29. I. antaŭ 120 policistoj. La rezulto de tiuj ĉi preparoj estis 4 kursoj: unu perfektiga (40 pers.) kaj 3 por la komencantoj, nome la publika por 55 pers., la dua por 35 policistoj kaj la tria por 30 lernantoj de mezaj lernejoj.

Pro multaj kursoj en Košice oni ne povis aranĝi samtempe ankaŭ kursojn en Prešov, kiel oni projektis. Sed oni atentigis pri esperanto en 2 urboj, kie la loĝantaro ne estis ĝis nun informita. En Spišská Nová Ves okazis 31. I. 3 prelegoj: unu antaŭ 550 lernantoj de burĝaj lernejoj, la dua antaŭ 620 lernantoj de mezaj lernejoj kaj vespere ĉeestis la trian 120 pers. En Bardejov ĉeestis 26. II. unu prelegon 240 infanoj el burĝa lernejo kaj la duan 200 pers. de la plej bona publiko. Ankaŭ en Košice okazis 30. I. prelego por 700 lernantoj de mezaj lernejoj.

Bonan propagandon faris radio-disaŭdigoj el Košice, kiuj okazis ĝis nun 4. 29. I. estis esperanta-ĉeĥa intervjuvo inter H. Seppik kaj konsilisto J. Friedrich „Kion oni scias en Estonio pri Ĉeĥoslovakio". 4. II. „Svedaj popolaj melodioj" per gramofondiskoj kun vortaj klarigoj de Seppik kaj ĉeĥa traduko de Friedrich, 21. II. por la lernejoj „Pri esperanto kaj pri Svedlando" kaj 22. II. „Norvegaj popolaj melodioj". Kvankam oni ne povis atentigi la esp. gazetojn pri tiuj ĉi disaŭdigoj, tamen multaj leteroj atestas, ke esperantistoj ilin aŭskultis! Bona estis ankaŭ la propaganda efiko inter la neesperantista publiko.

Lektoro Seppik montris sin kiel tre lerta propagandisto kaj bona pedagogo. Tion atestas precipe la fakto, ke preskaŭ neniu el la aliĝintoj forlasis la kurson, kontraŭe la kursoj ĉiam kreskis dum sia daŭro.

22. III. foriris lektoro Seppik al Prostějov kaj Olomouc, kie li restos ĝis la fino de majo. Kiu havas intereson pri liaj prelegoj, skribu al la redakcio de Ligilo en Prostějov. J. Friedrich.

---

# Lokaj informoj.

*Bardejov.* 2 prelegoj de Henriko Seppik 26. II.

*Brno.* EK: ĝenerala jarkunveno okazis la 1. II. El la tre enhavplena jarraporto pri 1936 ni citu: la klubo zorgas pri 5 stacidomaj informtabuloj kaj montrofenestro kun ofte ŝanĝata informmaterialo fiksita en multfrekventata loko. Okazis libro-ekspozicio kaj 4 kursoj kun sume 68 p. en Brno, kaj 4 kursoj aliloke. Estis publikitaj pli ol 122 gazetraportoj (el 172 senditaj). Foriris 567, venis 218 korespondaĵoj. Ampleksan fakon en la raporto okupis la kongreso kaj la novaj monataj amikaj kunvenoj kun altnivela arta programo, kiujn iniciatis s-o inĝ. A. Slavík, direktoro de Radiojournal Brno. La kasista raporto montris rimarkinde altan spezon, same la kluba havaĵo. Post enmeto de 28 novaj libroj konstistas nun la biblioteko el 260 volumoj. Novelektiĝis prez. s-o T. Kilian, vicprez. H. Stříhavka, sekr. s-o J. Vondroušek, kas.

s-o T. Borkovec, bibl. f-ino H. Šiprová. La jarkunveno sendis saluttelegramon al la ŝtata prezidento Dro Beneš. — 8. II. okazis la 2a Amika Vespero en la Spegulsalono de Passage. Proksimume 50 p., inter ili la direktoro kaj sekretario de Radiojournal Brno, s-o inĝ. A. Slavík kaj D. Chalupa. La programo, kiun organizis Radiojournal, enhavis ariojn el operoj de Smetana tradukitajn de s-o V. J. Šamla kaj prezentitajn de f-ino Vl. Stolejdová, s-o O. Skopal, s-o J. Válka kaj s-ino M. Nováková. — La 3a Amika Vespero okazis 7. III. Ĝi estis soleno okaze de la naskiĝjubileo de Prezidento-Liberiginto T. G. Masaryk, kun same impona programo. — Depost 11. II. kurso por 17 komencantoj kaj kurso por 10 progresintoj. Instruas s-o J. Vondroušek. EK decidis aranĝi Ĉe-metodan kurson gvidotan de s-o H. Seppik. Ĝenerale bedaŭrata estas la morto de s-ano Fr. Štourač, longjara membro kaj vigla, oferema kunlaborinto de EK. — Internacia Katolika Kongreso: ĝis nun aliĝoj el 9 landoj, inter ili eĉ Ĉinujo. La urba konsilantaro ekceptis honor-komitatanecon. — 7.—9. VIII. okazos jarkunveno de Internacio de Naturamikoj, kies sidejo estas en Zürich, Svisujo.

*České Budějovice.* EK „La Progreso" organizas aŭtobusan karavanon al la UK. en Wien. Kosto Kč 90 por 1 persono. Pasporto komuna. Aliĝoj ĝis 15. VI. ĉe „Esperanto Servo", strato Schneidrova 256. Por aliĝintaj neesperantistoj funkcias trimonata kurso malfermita 11. III.

*Český Těšín.* 19. I. ĝenerala jarkunveno de REL. 60 p. el 24 lokoj.

*Doubrava.* 2 kursojn, unu de Sokol por 50 komencantoj, gvidas f-ino M. Adámková.

*Dubí.* 22. III. kursfina festkunveno. Ĉeestis krom la 10 kursanoj kaj kursestrino f-ino B. Vlčková reprezentantoj de la loka popolkleriga komisiono (aranĝinta la kurson), gastoj el la publiko, delegito de EAĈSR s-o V. Echtner el Praha kaj eksterlanda gasto D-ro H. Grossmann, redaktoro de la e-a bahaa gazeto La Nova Tago, Neckargemünd, Germanujo. Post malfermo farita de f-ino Vlčková kaj saluto al la gastoj parolis s-o Echtner pri la praktika signifo de e. kaj pri la celo kaj laboro de loka e-grupo; laŭ invito de la kursorganizintoj li detale ekzamenis la lingvan scion de la kursanoj kaj spertis, ke ili post nur trimonata lernado kapablas uzi la lingvon. La kursanoj formos rondeton, al kiu la popolkleriga komisiono disponigis senpage kunvenejon en la loka magistrata domo. Ĉiuj kursanoj are aliĝis al EAĈSR.

*Fryštát.* 15. III. laborkunveno de REL.

*Horní Litvínov.* 11. II. malfermo de e. kurso organizita de Radio-Klubo Horní Litvínov kaj ĉirkaŭaĵo. Instruas s-o A. Slanina. La kurson anoncis radie ĈTK (ĉs. pres-oficejo).

*Kolín.* 24. I. jarkunveno de EK. 14 p. Elektiĝis prez. J. Janda, vicprez. J. Zindr, sekr. J. Václavek, kas. f-ino A. Weberová, bibl. J. Staněk.

*Košice.* Krom la konataj publikaj kursoj okazas kurso en la polica direkcio por 48 p. Gvidas s-o H. Seppik. Multaj gazetoj tre favore raportas pri lia laboro.

*Kutná Hora.* 13. III. jarkunveno de EK en hotelo Černý Kůň.

*Leitmeritz.* 16. III. ĝenerala jarkunveno.

*Lichnov apud Frenštát pod Radhoštěm.* 9. II. parolado de s-o Zanáška kaj fondo de E-societo; 15 membroj. Kurson por ili gvidas s-oj Zanáška kaj Michna. 31. V. oni inaŭguros Zamenhof-memorŝtonon.

*Melč.* „E-Rondeton" havas la loka burĝa lernejo. 40 p. En junio okazos lerneja ekspozicio kun e-fako. Gvidas s-o A. Tengler, instruisto.

*Mladá Boleslav.* 30. I. letervespero.

*Moravská Ostrava.* Kurson en Laborista Akademio gvidas s-o V. Slaný, 36 p.

*Orlová.* 16. II. laborkunveno de REL, 39 p. el 15 lokoj.

*Plzeň.* 16. II. komuna vizito de e-istoj al ekspozicio „Kiel laboristo konkeras la estantecon". La ekspozicio havas grandan e-fakon. Post la vizito ekskurso de laboristaj e-istoj. 7. III. laborkunveno de okcidentbohemaj e-istoj en restoracio „Nová Pošta." 8. III. ekskurso al Bukovec. 5. IV. okazos jarkunveno de LLE. — Por la Jubilea Fondaĵo starigita okaze de la 25a jarkunveno de la loka grupo de laboristaj e-istoj por la propagando en regiono Plzeň, donacis po Kč 50 — la „Regiona Sekcia Konsilantaro" kaj presejo „Grafika".

*Praha.* EK. jarkunveno 21. II. — Verda Stelo: kurson malfermitan en novembro pasinta partoprenas 17 komencantoj: instruas s-o H. Moder laŭ Ĉe-metodo. 6. II. laborkunsido; 13. II. f-ino Schallheim: Satira kritiko de anoj de Verda Stelo; 20. II. s-o K. Koutek: Miaj konversaciaj rondetoj; 27. II. s-o M. Hoche: La e-hejmo en Aspremont. — Malá Strana: 26. II. jarkunveno kun parolado de s-o R. Bloch pri la UK en Romo, kun lumbildoj kaj ekspozicieto. — 24. II. parolis pri „E. laŭ vidpunkto societa, nacia kaj universala" s-o K. Koutek en granda halo de Zlatá Husa laŭ invito de Klubo de la ĉs. nacia socialista partio.

*Prostějov.* 26. III. parolado kaj provleciono de H. Seppik.

*Radvanice.* Kurson gvidas s-o Hanzelka, 19 p. En multfrekventata loko pendas afiŝa propaganda kesteto. La loka e-societo ricevis post gazeta alvoko informpetojn de 36 p. el 30 div. lokoj. Jarkunveno elektis prez. A. Glet, sekr. J. Hanzelka, kas. J. Taraba.

*Slezská Ostrava.* 23. II. amuzvespero en Lidový dům. 21. III. jubilea jarkunveno de E-Rondeto nun 15 jara, kun parolado de s-o Ĉresnar.

*Smržovka--Morchenstern.* Pri sia pieda pilgrimo al la UK en Romo prelegis en societo de turistoj f-ino W. Waberich.

*Spišská Nová Ves.* 31. I. Sokol aranĝis 3 paroladojn de H. Seppik pri Estonujo kaj aliaj nordaj ŝtatoj, kun popolkantoj kaj lumbildoj. 1300 aŭskultintoj.

*St. Joachimsthal.* Laŭ oficiala sciigo ĉesis ekzisti loka e-grupo.

*Stonava.* 23. II. regiona laborkunveno.

*Třinec.* 7. II. kurson por komencantoj malfermis REL.

*Vodňany.* Regulaj konversaciaj kunvenoj de EK ĉiuvendrede je la 19a en gastejo „U Slepičků".

*Warnsdorf.* 20. II. jarkunveno de la loka laborista e-grupo. Novelektiĝis prez. H. Kindermann, sekr. A. Schiller, kas. f-ino E. Massak, arkivisto K. Müller.

*Zlaté Moravce.* F-ino M. Feldmannová gvidas kurson de Sokol por 9 komencantinoj; s-o Felt instruas samę grandan grupon de viraj membroj de Sokol.

---

# El la Gazetara Servo.

Tiu ĉi fako ekzistas jam multajn jarojn en la kadro de propaganda laboro de ĈAE. Ĝi estas unu el la plej sukcesaj institucioj propagandaj kaj ankaŭ modelo, laŭ kiu aliaj landaj kaj internaciaj centroj organizis sian Gazetaran Servon.

La titolo malkaŝas, ke temas pri tio, servi al la gazetoj nacilingvaj per artikoloj, informoj kaj notoj el la vivo de esperanto. Sed la ideo bone konsciata de ĝiaj organizantoj estas, servi al la movado per unu el la plej efikaj propagandaj rimedoj, la preso; duobla celo, kaj duobla rezulto. Pri ĝi bonegan raporton prezentis ĉiujare la jarkunveno de ĈAE.

En la Gazetara Servo funkcias, oni povas diri, du faktoroj. La unua estas oficiala. T. e. la regulaj cirkuleroj kun taugaj mallongaj notoj pri la sukcesoj de esp. laboro, kiujn zorge preparas, multobligas kaj dissendas la sekretariejo de ĈAE. La dua estas la bona laboro de multaj aliaj samideanoj tra la tuta ŝtato, kiuj pli-malpli regule sendas al diversaj organoj de la publika vivo plej ofte proprajn verkaĵojn pri la movado. La admirinda persisto de s-ino Šupichová en tiu ĉi fako estas ĝenerale konata.

Hodiaŭ ni rigardu, kiel aspektas la laboro de la lasta sekcio. Ni legis antaŭ nelonge, ke ekz. la rubriko en Národní politika „El Esperanto-Mondo" redaktata de s-ino Šupichová aperis jam pli ol 345 foje. Laŭ statistiko kompilita de la aŭtorino mem, aperis en la jaro 1936 tiu ĉi rubriko 72 foje. Krome aperis en N. P. 11 diversaj aliaj artikoloj de ŝi verkitaj. Aliaj regulaj rubrikoj de ŝi redaktataj estas en la semajna Týden rozhlasu, kie ĝi aperis 40 foje, kaj Měsíční zpravodaj, monata revuo de la libro-eldonejo A. Dědourek, Třebechovice p. O., apero 8 foja; 4 artikoloj estis en Rozhledy, 3 en List ŘÚš. svazu učitelek, 2 en la vespera eldono de Národní listy. Entute 140 artikoloj! Laŭda komentario estas superflua.

El la laboro de la diversaj aliaj samideanoj ni citu almenaŭ kelkajn ekzemplojn nur el la lasta tempo.

Lázně Bělohrad. Kiu ne konas la laboron de la loka grupo? La banloka semajna zazeto, n-ro 7 de la 14. VII. estas dediĉita al la jubilea ekspozicio tie aranĝita. En ĝi estas sur paĝo 9 raporto pri la esp. libertempejo kaj esp. fako de la ekspozicio.

Nova kolora afiŝo de la rozkulturejo Böhm, Blatná montras sur la unua loko bildon de rozo „Dr. Zamenhof" apud 8 aliaj rozospecoj. La 52 paĝa prezaro de tiu firmo enhavas priskribon aŭ mencion de specoj „Esperanto" aŭ „Dr. Zamenhof" sur paĝoj 8, 9, 10, 12, 20 kaj 35. Tiomfoje frapas la okulojn de trarigardanto propagandaj devizoj.

En „Nový Večerník", Praha, la 8. X. skribinto „šek" de artikolo „Kial ni ne havos en Praha E-kongreson" opinias, ke tion kulpas la nesufiĉa kompreno de niaj altaj oficoj.

Železniční zřízenec, Praha, 15. IX. enhavas felietonon de J. Pech, Plzeň, pri ekskurso de ĉs. fervojistoj al Nederlando. Pri ekskurso de samfakanoj sub gvido de J. Friedrich (Košice) raportas K. P. en Zprávy žel. inženýrů la 1. VII. 1934. En ambaŭ priskriboj oni legas, kian gravan helpon donis uzo de esperanto.

Dorost ČOB, Praha, n-ro 7, 1935, ekceptis artikolon de V. Š. „Esperanto a obchod".

En Tribuna filalelistů, n-ro 7—8/1935 sub Leteroj propagandas E-on J. Bároch, Praha, en Filatelistická Revue, n-ro 1/1936 estas artikolo de V. Š. „Esperanto a filatelie".

Průvodčí vlaků, n-ro 18/XV enhavas artikolon pri la jubileo de litvagonoj, tradukitan el E. de F. Pytloun, Bakov.

„Rozsévačka", (Praha) publikis „Leteron de sovetiaj infanoj" el Ĥarkovo, kun alvoko korespondi kun ili per E.

Bezpečnostní služba, n-ro 11/V, novembro, legigas artikolon de J. Vávrovský, Praha, „Esperanto ve službách janovské policie", kun kliŝaĵo montranta ĝendarmojn lernantaj esperanton.

Regulan E-Angulon krom la jam menciitaj ni vidis en České slovo, Mor. Ostrava; Dětská neděle (kurso por katolikaj infanoj gvidata de Mádr), Praha; Plameň, Slovakujo; Pilsner Tagblatt, Plzeň; kaj jenaj gazetoj Westböhmische Tageszeitung, Egerländer Tageszeitung, Marienbader Abendpost,

Marienbader Neueste Nachrichten, Südböhmische Tageszeitung.

Oni povas diri, ke efike kunlaboras ankoraŭ faktoro tria, nome la ĵurnalistaro neesperantista mem. Tiel ekzemple pluraj germanaj gazetoj, inter ili Neu-Titscheiner Zeitung, Znaimer Tagblatt, Mährisches Tagblatt k. a. ĉerpis el certa kongresreferato aperinta en Národní Listy, České Slovo, Praha k. a., jenan rimarkon: La germana lingvo estas la interslava Esperanto. Tiu ĉi malnova vero validas ĝis nun.

Svět mluví, 10. I.: Ĉeĥaj radio-aŭskultanoj skribis al Radiojournal, ke la programo de la kristnaska E-Horeto „Ĉeha Betlehemo" povus esti disaŭdigata ĉiujare kaj bedaŭras, ke oni ne povis la belan aferon aŭdi ankaŭ en la ĉeĥa lingvo.

I. Paal en Deutsche Zeitung Bohemia pledis per longa artikolo, 6. X., por la latina lingvo en internaciaj rilatoj. La titolo krias: Ne Esperanton — reiru al la latina! — Li laŭdas spertojn akiritajn ĉe uzo de tiu lingvo dum kongreso kaj ĉe internaciaj vizitoj en Trenčianské Teplice, kie univ. prof. Lenoch laŭdire kun la subteno de eksministro Dr. V. Šrobár kaj la baneja direkcio sukcese enkondukis ĝin. Ĉiuj afiŝoj, manĝokartoj k. s. estas latinlingvaj, en la informejo oni parolas latine. Ni ne dubas, ke tiu ĉi stranga raraĵo havigos al Trenčianské Teplice mondan famon.

En Nezávislá politika, Brno, ni sekvis polemikon de J. Podobský, okcidentalisto kun J. Šembera pri tio, ĉu venkos Occidental aŭ Esperanto. Sperto jam tre ofte ripetita diras al ni la respondon; la unua certe ne, la alia tre verŝajne.... kaj ni daŭrigos nian sulkon.

Slovenský Východ, Košice, 22. I. publikas intervjuon de -nk- kun estona Ĉe-instruisto H. Seppik pri la utilo de E. kaj Ĉe-metodo...

El la plej lasta tempo estas menciindaj precipe:

Plameň, Trnava: regula rubriko „E. pre začiatočníkov", gvidas Alojz M. Macek.

Unsere Zeitung, Praha: regula „E-Angulo" kun germanaj informoj sub „El la movado" kaj kurso.

Duch času, Moravská Ostrava: regula rubriko „Socialistický esperantista".

Zem, Bratislava: 3 artikoloj de Pavel Rosa „Problém medzinárodnej reči".

Nedělní list, Praha: 15. III. kompilaĵo de -ion- „Volání po dálkách v esperantu" pri spertoj el esperantista vivo.

ČSD, zpravodaj zamestnancov, Bratislava, regula „Esperantský kútik" kun fotografaĵo de propagande ornamita tramvojo en Nederlando, kaj „Esperantský kurz".

Národní politika, Praha: 25. II. fotografaĵo de ĉs. ĝendarmoj lernantaj sub gvido de s-o J. Vávrovský Esperanton.

Morgen-Zeitung, Moravská Ostrava: 9. II. artikolo pri „Internacional", nova internacia lingvo kompilita de Prof. Dro Pavle Mitrovic, Sarajevo.

Národní politika, Praha: 19. II. artikolo pri la samo.

Westböhmische Tageszeitung, Plzeň: ofta rubriko „Esperanto" gvidata de S. C.

Vodňanské noviny, Vodňany: „Esperantský koutek" gvidata de J. Slepička.

Nordböhmischer Volksbote, Bodenbach: regula „Esperanto-Ecke" kun kurso; gvidas F. f. V. E.

## Fondo de novaj lokaj grupoj.

Ni kompreneble sincere salutas fondon de ĉiu nova grupo, kiu signifas novan centron de aktiveco por la loko kaj regiono. Tial ni ĉiam per konsiloj kaj agoj subtenis samideanojn, kiuj deziris unuiĝi en sia loko.

Ni tamen spertis, ke ne estas rekomendinde klopodi pri fondo de oficiala grupo kun statuto kaj komitato kaj anonci la grupon al la ofico kaj publiko, se la fondantoj ne posedas la firman konvinkon, ke ili havas kaj havos almenaŭ iom imponan nombron da kunlaborantoj (por la komitato mem estas necesaj 8 personoj) kun daŭra kaj serioza intereso kaj entuziasmo. Ili devas studi ĉiujn cirkonstancojn, ĉu la aliĝontoj konsentos pagi kotizon, kiu ebligos seriozan laboron, kaj ĉu ekzistas ebleco de evoluo. Ĉiu komprenos, kiel grave malutilas ĉeso de grupo aŭ ĝia malaktiveco. Konsiderotaj estas ankaŭ diversaj detaloj, ekzemple ĉu la membroj de la preparata komitato estas ĉeĥoslovakaj ŝtatanoj, ĉu estos bona ejo plaĉanta almenaŭ al la jamaj interesiĝantoj. Fine ni mencias kondiĉon tre gravan, ke almenaŭ la estontaj laborgvidantoj estru perfekte la lingvon.

Kiam troviĝas rondo de samideanoj posedantaj ĉiujn supre diritajn kvalitojn, ni varme al ili rekomendas, ke ili kunvenadu dum iom da tempo sen formalaĵoj. Ili kunvenu laŭeble regule, restu en daŭra rilato kun la tutŝtata organizo kaj ili decidiĝu fondi oficialan grupon, kiam ili klare vidas, ke estas plenumeblaj ĉiuj necesaj kondiĉoj.

La oficiala fondo de grupo estas afero plej simpla. Nia organizo havas nun la eblecon aranĝi tiun fondon mem, ĝi mem prezentos la necesan petskribon kun la necesaj aldonoj, ĝi transdonos la aprobitan statuton al la loka grupo kaj la grupo povas ekfunkcii. EAĈSR liveros al la grupo poste la deziratan nombron de statutoj kaj la membrokartojn. La grupo pagos la nuran koston de la petskribo kun la presaĵoj, la

impostmarkojn kaj la afrankon. Post fondo ĝi pagos ankaŭ la oficialan takson fiksotan de Landa ofico.

Samideanoj, kiuj faris la preparojn por fondo de grupo en sia loko aŭ kiuj deziras komenci tiun laboron, bonvolu interrilatiĝi kun EAĈSR.

## Helpu nin ŝpari!

Se vi akceptadis ĝis nun la Bultenon, ni rajtas kredi, ke vi volas esti membro de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko kaj kunhelpi tiel al la progreso de nia afero en la respubliko.

Se vi ne pagis ankoraŭ vian kotizon, faru tion nun tuj!

Sendu Kč 16·— al la poŝtŝparkasa konto nro 9.692 de „Svaz čs. esperantistů, Praha" (per blankopagilo, aĉetebla en ĉiu poŝtoficejo por 5 hel., se vi perdis la senditan). Se vi pagas al ni per via klubo, aranĝu, ke la kasisto senprokraste sendu la kotizon.

Se via mono ne venos baldaŭ, ni devos vin admoni. Helpu nin ŝpari laboron kaj kostojn! Ne atendu admonilon kaj pagu rapide!

La venonta numero de Bulteno estos sendita sole al la pagintoj.

## Esperantista vivo.

**Edziĝo.** Nia membrino Růža Kratochvílová kaj nia longjara laboranto en Gazeta Servo Miloslav Staněk en Praha festis sian geedziĝon la 22-an de februaro 1936. Koran gratulon!

**Naskiĝo.** Al gesinjoroj Echtner naskiĝis 25. II. 1936 filino Hančička. La nova mondcivitanino akceptu bondezirojn de feliĉa vivo same kiel la gepatroj.

**Morto.** Laŭ informo de Esperantista klubo en Brno mortis ĝia malnova membro kaj membro de ĈAE, samideano František Šťourač, vitristo. Foriris bona homo kaj oferema laboranto. Honoron al lia memoro!

**Morto.** Nia prezidanto D-ro Kamaryt perdis 23-an de marto sian patrinon. Ĉiuj liaj amikoj sentas kun li la doloron.

## Informoj.

**XXVIII-a Universala Kongreso de Esperanto.** Anoncu vin plej rapide ĉe LKK. Uzu la malaltigitan kotizon ĝis fino de aprilo. EAĈSR preparas komunan vojaĝon de ĉeĥoslovakaj partoprenantoj. Gvidas s-ro R. Bloch, estro de Turista komisiono de EAĈSR.

**Ĉe-kursoj en la Esperanto-domo, Arnhem,** okazos dum julio kaj aŭgusto. Internacia rondvojaĝo tra Nederlando 17.—22 aŭgusto. Postulu detalan prospekton de Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

**Internaciaj feriaj kursoj esperantaj** en Helsingor (Danlando) dum julio kaj aŭgusto. Unusemajna loĝo kaj manĝo Kč 175·—. Pri detaloj informas L. Friis, sekretario de Dana Esperanto-Instituto. Thyrasvej 15, Aaabyhöj. Danlando.

**XXV-a Belga Esperanto-Kongreso** okazos en Louvière dum pentekosto. Tre alloga programo. Anoncu vin ĉe LKK, 1 rue St-Joseph, La Louvière, Belglando.

**Al ĉiuj amantoj de bona literaturo.** Ni estas en daŭra rilato kun la eldonejo AELA—LITERATURA MONDO en Budapest kaj ni ankaŭ persone konvinkiĝis, ke oni tie streĉe laboras por liveri al la abonintoj ĉion promesitan. La libroj el la pasintjara serio estas ja eksterordinare malfrue liveritaj, sed pri la prokrasto ne estas sole la eldonejo kulpa. Ofte kulpas la aŭtoroj, resp. la tradukantoj, ofte aliaj cirkonstancoj kaj kompreneble ne lastvice ankaŭ la nesufiĉa subteno flanke de la esperantistaro. Ni konsciu, ke estas nia honora devo teni la kuraĝajn samideanojn budapestajn, kiuj al ni liveris ja tiom da valoraj verkoj. AELA post venko de doganaj malfacilaĵoj ekspedis la *Ĉeĥoslovakan Antologion*, fieron de esperantistoj ĉeĥoslovakaj. Ĝi estis la lasta libro el la serio 1934. El jaro 1935 serio A estis ekspedita *Plena Gramatiko* de Kalocsay-Waringhien, libro, kiun devas havi ĉiu serioza studanto de la lingvo. El serio B estis ekspedita *Interpopola paco* de Edmond Privat. Finpresita kaj espereble baldaŭ ekspedata estos la dua volumo de *Arthistorio* de Heikler. El serio C ni ricevis sole ja *Tri homojn en boato* de Jerome kaj *El la Verda Biblio*, sed estas en presejo la fama *Romano de San Michele* de Axel Munthe. La abonantoj paciencu do kaj la neabonantoj ĝisnunaj anoncu sin ĉe Libroservo de EAĈSR, kiu donos ĉiujn detalojn. La nova programo por 1939 estos anoncita, nur kiam plejparto de la antaŭaj libroj estos en la manoj de la abonantoj. Literatura Mondo anoncas sian regulan aperadon por 1936 en 6 duoblaj kajeroj.

**Esperanta Pensiono en Potštejn** estis starigita de Inĝ. L. Berger. Moderaj prezoj kaj esperantista societo certe allogos multajn samideanojn en la ĉarman lokon. Detalajn informojn volonte donos la posedanto.

**Ligilo nro 5 de I-a jarkolekto.** Tiun numeron serĉas por sia biblioteko Otto Ginz, Praha II., Stárkova 4. Kiu povas ĝin malhavi, sendu ĝin kun la indiko, kion li deziras rekompence.

**Pri kursoj en Danlando.** Por servi al la progreso de Esperanto kaj por doni al eksterlandanoj favoran okazon viziti Danlandon, kie oni mo-

mente povas pasigi agrablan ferion tre malmultekoste pro la malalta valoro de nia mono, gesinjoroj Stig B. Skole, „KORNMOD", Silkeborg, aranĝos kursojn, en kiuj partoprenos homoj el multaj landoj. De 3. majo ĝis 31. julio estos 3-monata kurso, kiu nur kostas Kč 376·—. De la 10. ĝis 19. julio kaj de 22. ĝis 31. julio estos 10-tagaj kursoj, kiuj nur kostas po Kč 215·—. En la kursoj instruos eminentaj instruistoj. Krom danoj instruos: prof. Collinson, Anglujo, prof. d-ro E. Privat, Ĝenevo, prof. W. Rerendsohn, Germanujo, s-ro A. Weide, Germanujo, s-ro de Ward, Nederlando, gesinjoroj Stellan Engholm, Svedujo, poeto Thorberggur Thordarson, Island, kaj eble pli. Silkeborg situas en la mezo de Jutlando inter arbaroj kaj belaj lagoj. Ĝi estas „La perlo de Danlando". Skribu pri detalaĵoj al s-ro Stig B. Skole, Internacia Lernejo Akademio „Kornmod", Silkeborg, Danlando.

**Bicikle al la Viena kongreso.** Bonaj, maturaj kaj memstaraj esperantistoj, kiuj volus kunvojaĝi bicikle komence de aŭgusto al Vieno, skribu tuj al Alois Nydrle, Kladno, Příční 1639.

**Esperanto en „Týden rozhlasu".** „Týden rozhlasu" mem ĉesigis aperadon de mia Esperanto-rubriko, *ne mi*. Tion bonvolu scii la afablaj legantoj kaj amikoj, kiuj — tiom multnombre — montris simpation al mia modesta laboro. Dankon kaj saluton! Mi ne ĉesos. Julie Šupichová, Praha II., čp. 2032.

## Fondaĵo de Bulteno.

Kun ĝojo ni ricevas de niaj membroj leterojn esprimantajn ilian kontenton pri la enhavo de la Bulteno, kiu fariĝis nepre necesa raportanto pri la movado en la respubliko. Nia modesteco malpermesas al ni citi ĉi tie tiujn laŭdojn.

Praktike substrekis sian aprobon samideano Mauksch el L'ubica apud Kežmarok sendinte al ni monan subtenon por nia presa fondaĵo. Kun sincera danko ni ĉi tie anoncas ĉi tiun unuan donacinton: s-ro Vilemo Mauksch, L'ubica Kč 100·— kun la espero, ke anoncos sin sekvantoj.

Ni kvitancos la alvenintajn sumojn kaj en la jara bilanco trovos niaj legantoj, kiel la mono estis uzita.

---

**GERMANA ĈEFEĈ-ŜLOSILO**

en speciala eldono por Ĉeĥoslovakio aperis. Zorgu ĉiuj, ke ĝi disiru grandkvante inter la germanlingva loĝantaro de nia respubliko. Libroservo de EAĈSR liveras unu ekz. por 1 Kč afrankite. Kun mendo sendu samtempe pagon al poŝtŝparkasa konto n-ro 12.371 de „Svaz čs. esperantistů, Praha".

## Al niaj grupoj!

Ni atentigas denove la multfoje ripetitan kondiĉon, ke la malaltigitan kotizon de Kč 12·— pagas la korporaciaj membroj (aliĝitaj al EAĈSR per sia klubo) sole tiam, se ĉiuj membroj de la grupo estas ankaŭ membroj de EAĈSR.

**Estas afero de honesto, ke la grupo pagu komplete por sia tuta membraro.**

Kasisto de EAĈSR petas urĝe la grupajn kasistojn, ke ili sendu plej rapide la ricevitajn kotizojn.

---

### Konkurso kun gravaj premioj por poetoj kaj arttradukistoj.

Por ricevi unuarangajn tradukojn de kvar kantoj konataj kaj originalan esperanto-tekston por unu, Literatura Mondo elskribis publikan konkursou kun premioj de svfr. 130·—. La premiitoj estos registritaj inter la tradukontojn kaj verkontojn de la tekstoj de gramofondiskoj, fabrikotaj en granda nombro de grava sveda firmo, kiu siatempe por ĉiu traduko pagos honestan honoraĵon. La limtago de la konkurso estas 1-a de majo 1936. Detalojn pri ĝi sendas al petanto senpage LITERATURA MONDO Budapest IX. Mester-u. 53. Hungario.

---

## Al membroj de Universala Esperanto-Asocio!

Pro subita morto de s-ro direktoro Kreuz okazis kelkaj neregulaĵoj en la laboro de Centra Oficejo de UEA. La oficiala revuo aperas kun prokrasto kaj malhelpitaj estis ankaŭ la preparoj por eldono de nunjara Jarlibro.

Ni insiste petas la membrojn, ke ili montru la paciencon dum nuna nefacila tempo. Kiu ne pagis ankoraŭ, bonvolu plej rapide nun sendi sian kotizon al poŝtŝparkasa konto n-ro 9602 de „Svaz čs. esperantistů, Praha". Invitu viajn amikojn, ke ili helpu kun vi starigi fortan fundamenton por nia internacia organizo. Ĉiuj membroj, kaj la delegitoj speciale, varbu novajn membrojn!

Ni estas konvinkitaj, ke ĉeĥoslovakaj esperantistoj komprenos la gravecon de nuna situacio.

*Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko.*

## Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveras la libroservo de EAĈSR afrankite por la indikita sumo.

*El Verdavalo*. Eld. Verdavalo-Eldonejo, Sandakan, P. O. Box 149, B. N. Borneo. Ĝis nun aperis 3 n-roj, ĉiu en kovrilo kaj kun 16 pĝ. 14x23 cm. Malnova samideano, vivanta jam depost multaj jaroj en plej sovaĝa oriento, rakontas pri siaj vere neordinaraj travivaĵoj en tiuj ĉi kajeroj, kiujn li intencas de tempo al tempo eldoni. Mendante rekte ĉe la aŭtoro (2 respkup. unu kajero) oni partoprenas interesajn konkursojn. Nia Libroservo liveras la kajerojn po 3 Kč. Postulu de LS detalan prospekton.

*André Varagnac, Folkloro kaj kolektivaj esploroj per bonvolaj informantoj*. Trad. H. Ferez kaj R. Gérard, Reims. 8 pĝ 13x20 cm kaj kovrilo. Prezo Kč 2·10. Interesa broŝuro pri la grava temo: kunhelpo de la publiko en folkloraj studoj. Ni ĉiuj devas klopodi enkonduki esperanton en la praktikon. Tial estas nepre subteninda tiu ĉi bona verketo.

*Poŝtistoj, telegrafistoj kaj telefonistoj* legu vian fakan organon *La Interligilo de P.T.T.*, aperantan en Paris 15-e, 324, rue Lecourbe. Ĉiu abonanto ricevos senpage tutmondan profesian adresaron nun presatan. Anoncu vin kaj petu laŭ supra adreso specimenan numeron de la revuo.

*N. van Hichtum, Kudlago, la magranda eskimo.* El nederlanda lingvo tradukis S. D. Mannoury. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 40 pĝ, 12x19 cm, en kolora kovrilo. Prezo Kč 5·20. Interesa rakonto pri knabo eskima kaj pri lia malfacila vivo en malproksima nordo. Lingvo senriproĉa.

*La juna vivo* (West Graſdijk N. H., Nederlando), la bona gazeto por esperanta junularo, enmetis en sian decembran numeron simplan teatraĵon *„La novaj vestoj de la reĝo“* laŭ la Zamenhofa traduko de la fama fabelo de Andersen. Ĝi tre bone taŭgas por klubaj festvesperoj. Ni salutas la aperon de la ĉarma teatraĵo kaj varme rekomendas al niaj grupoj prezenti ĝin. La prezentrajton oni ricevas aĉetante 8 ekz. de la teksto por 20 Kč. La mendon volonte peros L. S.

*I. Lejzerowicz, El la Verda Biblio kaj Babiladoj kun Horaĉo Serĉer*. Ilustr. de R. Laval. Eldonis AELA, Budapest. 104 pĝ 11x13 cm. Prezo broŝ. Kč 7·90, bind. Kč 13·20. Ĉarma libreto, kies kelkajn ĉapitrojn konas la legantoj de Literatura Mondo. Lejzerowicz estas unu el la malmultaj esperantistoj sciantaj, kio estas la vera bonhumoro.

*Upton Sinclair, Petrolo*. 1-a volumo. Tradukis W. Bailley Eld. The Esperanto Publishing Co., London. 306 pĝ. Prezo bind. Kč 25·—. Kun ĝojo ni salutas la aperon de tiu fama verko, kiun prezentas al ni Bailley en bona esperanto. La libroj de la londona eldonejo distingiĝas per plaĉa eksteraĵo.

*Korektoj kaj aldonoj al la Katalogo de esp. glumarkoj* estas laboro, kiu sendube kostis grandan penon al la verkinto dro J. Takács, sed la verketo prezentiĝas en aspekto tute malalloga. Pro nesufiĉo de rimedoj aperis la 24-paĝa broŝureto multobligite kaj la multobligaĵo ne estas tre pura. Ĝi ja faros bone sian servon al la fakuloj, sed tamen trudas sin la demando, ĉu ne estis rekomendinde serĉi rimedojn por eldonaĵo pli ekceptebla. Tamen la kolektantoj ĝin bone povos uzi. TAK-membroj (adreso Dro J. Takács, Nagymaros, Hungario aŭ F. V. Mizera, Jablonné n. Orl.) ricevas ĝin senpage. Libroservo povas ĝin liveri por Kč 2·70.

*Delfi Dalmau, Ilustrita lernolibro de Esperanto. Metodo „Didakta“*. Eld. la aŭtoro, Barcelona. 24 pĝ 17x24 cm. Prezo Kč 13·20. Riĉe ilustrita lernolibro. Sur unu paĝo estas bildoj multkoloraj. Sur aldonita folio „Gvido por la instruisto“. Nia kataluna amiko Dalmau verkis lernolibron laŭ speciala motodo, kiu meritas esti provita ankaŭ en nia lando.

*Cesta k radosti a štěstí*. Al parto de nuna eldono estas aldonita prospekto pri ĉi tiu verko de nia amiko Alois Pajkr. Kiu bezonas spiritan fortigon, akiru la libron plenan da bonaj instigoj. Povas ĝin liveri ankaŭ Libroservo de EAĈSR por Kč 10·— afrankite.

---

### Korespondi deziras:

J a c q u e s K u c e r a, 12 bis, Cours Grandval, Ajaccio, Korsika, Francio. Interŝanĝas il. pk.

I v a n V a l ĉ a n o v, gimnazia instruisto, Tirnovo, Bulgario, serĉas por siaj 50 lernantoj korespondantojn.


**ROZOJ:**

*„ESPERANTO“*
*„D-ro ZAMENHOF“*

*Roz-plantejo J. Böhm, Blatná (ĈSR).*

Petu prezoliston!

**Hungara-Itala Banko**

BUDAPEST

Se vi vojaĝos al Hungario, uzu la servojn de la banko, kie oni parolas esperante.

Sidejo:

**Budapest V., Nádor-utca 16,**

naŭ filioj en la urbo.

## LA LIGILO

la sola ĉeĥoslovaka revuo aperanta.
Valoraj literaturaj aldonoj. Jarabono Kč 15·—

## NIA GAZETO

internacia revuo aperanta en libera Francujo. Jarabono . . . . . . . . Kč 20·—

## LA PRAKTIKO

revuo de Internacia Ĉe-Instituto, riĉe ilustrita, multaj konkursoj kun premioj. Jarabono . . . . . . . . . . . . . Kč 40·—

## LITERATURA MONDO

kun fama kunlaborantaro. Jarabono . Kč 60·—
2 n-roj al unu adreso Kč 96·— jare,
3 n-roj Kč 132·—, 4 n-roj Kč 168·— ktp.
por ĉiu plus n-ro Kč 36·— jare.

## LA JUNA VIVO

bonega revueto por junuloj kaj komencantoj. Jare . . . . . . . . . . . . Kč 16·50

## SCIENCA REVUO

dumonata revuo popularscienca. N-roj po 24 pĝ. kaj kovrilo. Jare . . . . Kč 25·—

## BULTENO DE I. SCIENCA ASOCIO E.

Kvar n-roj po 12 pĝ. kaj kovrilo. Kune kun kotizo de ISAE jare . . . . . Kč 20·—

Pagu al Libroservo de EAĈSR per blankopagilo plenigota per n-ro 12.371 kaj „Svaz čs. esperantistů, Praha“. Sur mezan parton de la pagilo notu, kion vi mendas.

**Internacia Esperanto-Altlernejo „KORNMOD“ en Silkeborg (Danlando)**

Trimonata kurso de 3. majo ĝis 31. julio 1936. De 10. ĝis 19. kaj de 22. ĝis 31. julio du specialaj internaciaj kursoj. En la 10-tagaj feriaj kursoj prelegos universitataj profesoroj kaj eminentaj ekster- kaj enlandaj esperantistoj. Postulu programon kaj detalojn ĉe Lernejestro Stig B. Skole, Silkeborg, Danlando.

**Monte-Carlo — Monaco**
**Hôtel des Étrangers**

Unuaranga hotelo kun moderaj prezoj. La posedanto J. Gelder estas esperantisto. Kiu deziras pasigi sian libertempon sub brila suno kaj en plej favora klimato mara, postulu prospekton.

**Esperanta Libertempejo**
**Lázně Bělohrad**

Ĉarma trankvila banloko. Ĉiam agrabla samideana societo. Petu detalojn de Esperantista klubo, Lázně Bělohrad.

**Schruns — Vorarlberg (Aŭstrio)**

Se vi deziras pasigi someron en alta montaro, veturu al pentrinda Vorarlberg. UEA-Delegito Hans Neyer, Schruns 40 (Vorarlberg) sendas laŭ peto detalojn pri agrabla kaj malmultekosta vivado tie.

**Esperanta pensiono Potštejn**

Bele aranĝitaj ĉambroj, gazetoj, esperanta konversacio. Inĝ. L. Berger, Potštejn.

Ĉiu esperantisto povas havi propran bibliotekon!

## Populara Esperanto-Biblioteko

estas bona kaj malmultekosta serio de esperantaj libroj. Prezo por bele bindita libro 25 Kč.

La jenaj libroj jam aperis:

Upton Sinclair, PETROLO, Vol. I.
H. G. Wels, LA DORMANTO VEKIĜAS
C. Collodi, PINOKJO
Rider Haggard, LUNO DE IZRAEL
E. P. Oppenheim, LA ORA ŜTUPARO
E. P. Oppenheim, RIĈA KAJ SEN MONO
Ferber Edna, FANNY
R. Haggard, ŜI
Ivans, LA VIRO EL FRANCUJO
H. Sienkiewicz, QUO VADIS? Vol. I., II.

**Mendu ĉe LIBRO-SERVO de Asocio.**

## ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO

Internacia kritiko nomas la verkon fiero de esperanta literaturo.
Montru, ke vi komprenas, kion ĝi signifas por ni, ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

Ni povas plenumi rapide ĉiujn mendojn. Prezo Kč 60·— broš., Kč 80·— lukse bindita.


Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. - Tiskne A. Pražák Jabloné n. O. - Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102 047-VII-1933. - Podací úřad Praha 45.